Tiam la patro de la edzineto demandis ĉu ili ne kartludu atendante la manĝaĵon? La viroj konsentis. Ili dividis sin en du grupojn. La novelzo sidis flanke de sia bopatro; antaŭ li sidis lia propra patro kaj la atestanto. Ĉe la mikso liaj manoj tremetis : kartludi en tago tia, ĉu el tio ne fontos malfeliĉo? Li ludis distrate, kuntiris la brovojn kaj alrigardis foje-foje sian edzinon. Lia rigardado kvazaŭ senkulpiĝon. Li subite ekkonsciis, kiel aminda estas la juna infano meze de grizaj kaj maturaj virinoj.

Nun ŝi babulis kun lia patrino. Pli ĝuste: tiu ĉi priparolis kun ŝi kion ŝia filo prefere manĝas kaj kiel plej bonguste preparitaj di deziras la manĝojn. Tamen ankaŭ pri pureco en mastrumado kaj pri arango de la lito laŭ lia deziro.

La patrino de la novelzino rakontis pri naskiĝoj kaj malsanoj; la edzineto ricevis multan bonan konsilon. Sed ŝi senatente aŭskultis : ŝi pripensis la propran mastrumadeton, kiel plej bone ĉion ordigi, kion morgaŭ aldoni al liaj buterpanoj, kaj, kiam ellitiĝi por ke li ĝustatempe alvenu en la fabriko; la vekhorloĝo sonoru je la sesa.

Ambaŭ patrinoj nun parolis samtempe. Unu el la patroj postulis silenton en la virinaĉa angulo; la alia patro opiniis ke ili sentime parolu plu « virinaĉa klaĉado ne ĝenas seriozan viron ».

Kur forestaj pensoj, la novelzo refoje disdonis la kartojn. Li malgajnis; ade li malgajnis. Do ankaŭ lia bopatro malgajnis, kaj fine tiu ĉi furioziĝis pro tia perdo; ĉar ĝi tuŝis lian prestiĝon de sperta kartludanto. La kartludo, vidata nun, estas pli stulta ol stulta, tian fuŝadon li neniam vidis. Kiu instruis kartludon al ĉi tiu simio? Ĉu li eble ĝin tiel lernis **hejme**?

La virinoj silentis; plej bone estis ne glekti tian eksplodon.

Dum la senbruo, ili pensis pri la multaj venkitaj baroj, antaŭ la nerevokebla plenumo de la geedziĝo. La gepatroj revis

alian kunulon por sia infano; vole malvole ili aprobis tiun ĉi geedziĝon.

La edzo ree disdonis, iomete malbonhumora kaj angora. Ili denove malgajnis.

Furioza, la bopatro jetis la kartojn. « Simia knabo », li ekkriis. La patro de la novelzo respondis : « Urso! ».

La antaŭa disputo tuj ekflamis. Nun ĝi

LODE ZIELENS (1901-1944)

Antaŭ du jaroj, fine de novembro, en Antwerpen kie li naskiĝis, milita monstraĵo, V-2 bombo, atencis lian korpon kaj lian genion; ĝi samtempe atencis nian beletron, kiu perdis verkiston jam multe pli ol promesano.

Muzikama patro, senlaca penado faris artisto ĉi tiun tipan proleton, iaman havenlaboriston; li cetere trairis diversajn profesiojn, fariĝis redaktoro de la socialista « Volksgazet » (Popola Gazeto), oficis dum la milito ĉe la Muzeo de Flandra Literaturo kaj instruis en la Akademio por Belaj Artoj en Antwerpen; post la liberigo li ree partoprenis la redaktadon de « Volksgazet » kaj revenante de sia laboro falis kiel viktimo de la milito li, kiu revadis pri socio sen milito kaj sen malriĉo!

Li publicis komence plurajn mallongajn rakontojn, inter kiuj « Antoinette, onze Moeder » (Antoinette, nia Patrino) estis. En siaj romanoj « Het jonge Leven » (La Juna Vivo), « Het duistere Bloed » (La Malhela Sango), « Moeder, waarom leven wij? » (Patrino, kial ni Vivas?), kiu atribuis al li la ŝtatan premion por Flandra Literaturo, « De Gele Roos » (La Flava Rozo), « Nu begint het Leven » (Nun komenciĝas la Vivo), « De Dag van Morgen » (La Morgaŭa Tago) k.a., li pentras la Antverpenan popolan klason en mizero iel tro sistema, kies fonon tamen lumigas boneco kaj espero pri sociala re-

formo. Li krome verkis noveletojn en « Lees en Vergeet » (Legu kaj Forgesu), el kiu estis ĉerpita la suba, kaj en « Herinneringen van Toen » (Tiamaj Memorajoj); post lia morto estis eldonita trilogio kies unua (Alles wordt betaald : Ĉio estos pagita) kaj dua (Menschen zoals Wij : Homoj kiaj Ni) partoj aperis ĝis nun.

La tono de Lode Zielens ne estas tre beletra : lia sentemo kaj emocio parolas kaj superfortas lin, sed la konstruo de la romanoj tamen superas ilian lingvon. Li apartenas al la aŭtoroj kiuj renovigis la rakontan prozon kaj li bildigis plurajn infano- kaj virinofigurojn kiujrestos ĉiamaj en nia Literaturo.

Ni ne povus resumi la « kazon » Lode Zielens kaj interpreti la esencon de lia verko kaj de liaj aspiroj pli trate ol citante unu el la lastaj alineoj de « Moeder, waarom leven wij? », kiu jene tekstas en Esperanto :

Ni homoj, ni vivas kaj ni mortas. Ni suferas por vivi. La ĝojo ekbrilas por ni nur kiam ni pagas ĝin per aflikto. En la spacon tiam levigas nia krio al feliĉo. Sed niaj gefratoj, — precipe infanoj, la miaj kaj la viaj, kamarado, daŭrigis la vokadon kaj baldaŭ ĝi pli potence sonegas trans la eternon. Eble ni tiam aŭdos ĝin, kie ajn ni estos. »

D.ro T. VAN GINDERTAELEN.

LA FANFARO DE L'HEROLDO!

Ke la fama « Heroldo de Esperanto » reaparis, vigla kaj lerta kiel ankaŭmilite, jen okazajo kiun, laŭ nia opinio, ne sufiĉe testis ĝiaj kunratoj. Oni povis eĉ legi en nialanda esperanta gazeto recenzon malfavoran, kiu finiĝis malkonsilante individuajn abonojn; nun kiam Heroldo laŭte krias al la mondo ke « venis nia horo », estas ege bedaŭrinda ke grumbas iuj kiuj nepre devus esti ĝiaj apogantoj kaj kamaradoj, sed ne ankoraŭ konvinkiĝis ke « nun aŭ neniam ni prenu nian ŝancon ». Multaj samideanoj tamen kompreneble, kaj tio pravigas fieracon!

Heroldo ja estas kiel ni ŝatas ĝin. Fidela al siaj legantoj, petanta fidelecon de ili. Amika interruato, kiu esprimiĝas, flanke de la redakcio en la t. n. babiladoj kiuj malkaŝe klarigas la situacion de la gazeto, flanke de la leganto per iom lebra pririgardo de la jus ricevita numero kaj senpacienca atendo de la sekvonta.

La ĉefa rolo de tia gazeto estas kleriga kaj unuiganta. Konigi unu popolon al la aliaj estas plej efika rimedo por kunfratigi ilin, dum manko de tia interkompreno fremdigas, kaŭzas maledimon kaj ebligas akrajn konfliktojn; trafe pruvis tion la franca verkisto Jean Giraudoux kiu riproĉis al siaj samlandanoj ke ili konstruis digojn kontraŭ la najbaraj kulturoj. Same pensis la filozofo René Baert (kvankam li estis fanatikulo pormilita kaj nacisocialista) : sufiĉus kompreni la profundan

signifon de la artaj kreitaĵoj de iu popolo, por neniam plu trompiĝi pri la intencoj kaj la valoro de tiu popolo.

Por ebligi tiajn bonitarajn kontaktojn, Heroldo fervoras plejebale; ni persone memoras pri nia novesperantista ekmiro, kiam ni, antaŭmilite, foliumis kolekton de Heroldo kaj tie trovis artikolon pri Hindoĉinujo, pri la tiea loĝantaro. Tiu tradicio jam estas reprenita; el Rio de Janeiro skribas Ismael Gomes Braga, el la Egipta ĉefurbo sendas komunikajojn Tados Migalli, el Jugoslavujo D.ro Vuko Jovanović; kaj el Usono alvenas bildo de Joseph-R. Scherer, — la sama Scherer kiel en 1930 : serioze plenumante plej ravajn taskojn, ekz. fotografiĝi meze de kinosteloj aŭ « producers ».

Tiel estas Heroldo : kiel ni ŝatas ĝin. Teo Jung habilas, klarigas aŭ pruvas, jen veas, jen ĝojfarias, laboregas. Por li ja ne temas pri « ludĉevaleto »...

Sume : sukceso. La oka numero anoncas 1500 abonantojn en 45 landoj. Tiel Heroldo superis sian antaŭan staton : la 976-a numero (22 majo 1938) parolis pri 1025 pagantaj legantoj kaj eldonkvanto de 1500 ekzempleroj.

Nia granda, sendependa, internacia gazeto, nun jam duonmonata, eldonita per nia vigla Flandra Esperanto-Instituto ne nur estas heroldo de nia movado; por ĉiu el ni ĝi estas atesto kaj referenco en la ĉiutaga verdula vivo. F. PIOT.

TUTMONDAJ FILATELISTOJ ATENTU!!! NOVA ! UNICA ! DOKUMENTAR

PLENIGAS GRAVAN MANKON SUR KAMPO FILATELA

Ĝiaj kvinlingvaj rubrikoj helpas vin :
— legi filatelajn verkojn, gazetojn, revuojn, ktp.
— korespondi kun amiaj kolektistoj en lingvoj.

NEDERLANDA — FRANCA — ANGLA — GERMANA — ESPERANTA

DOKUMENTAR aperos en la komenco de decembro kaj estas havebla nur per enskribo.

— Belega verko (140 p.) — Prizorgita preso — Multaj ilustraĵoj.
— En tola bindo kun orpresio (eldonnumero 1500) : bfr. 150.
— En luksa, duonleđa bindo (numeritaj kaj subskribitaj) : bfr. 250.

Por eksterlando sendokostoj plie (10%)

Libro-Servo de FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO.

infektis ankaŭ la virinojn. Malnovajn okazaĵojn ili kriis unu al la alia kaj ili reciproke riproĉis multan malbelon. Ke la patroj amivalis, ke unu edzinigis la virinon deziritan de la alia. Ili ŝvingis akrajn vortojn de tablo al tablo. Ili paliĝis de pasio kaj furiozo : unu renversis glason. Ili estis batalontaj, neniam ili tiel akre kaj draste esprimis kion ili dum jaroj dudek kvin silentis kaj subpremis. Kaj nun ili ankaŭ ekkriis kial ili ne ŝatis ĉi tiun geedziĝon, por ke ĉiu aŭdu kaj bruatigu ĝin en la tuta urbo. Unu furioze foriris : lia edzino devige sekvis. La alia kolerege forpaŝis, lia ankoraŭ insultanta edzino tuj sekvis.

La atestanto diris : « Ankaŭ mi foriras, domaĝe pro la bona manĝaĵo, mi tiel kalkulis kun ĝi ! »

Solaj ili sidis nun ĉe manĝotablo, la pala blonda edzineto kaj la ankoraŭ tremanta edzo. Si premis sin al li, karesis lian manon.

« Karulo, vi tre bone agis; ili estas for! »
« Via patro malpravus, » li abrupte respondis, « kial li komencis? »

« Nepre, » ŝi ridetis, « via patro malpravus partoprenante la disputon. »

« Aŭskultu foje, » li diris...

« Aŭdu foje, » ŝi interrompis...

« Trezoro! » li diris.

« Karulo, » ŝi kveris. « Tio jam pasis, ĝi neniel rilatas nin. Ke via patro kaj mia patrino... tio ne koncernas nin. Ni ne desiros pro malfavora karto. »

« Maria, » li diris.

« Simio, urseto, Jan! Ni estas aliaj! »

Ili manĝis la testudan supon.

Li sopiris :

Ili verŝajne revenos, kiam ili pripensos la bonan manĝaĵojn kiun ili forlasis! »

« Ho ne, » ŝi elreviĝinte diris, « ni restu solaj; ĉi-vespere estos eĉ pli bone, edzo, tiam ni manĝos ĉe ni, tutsolaĵ! Kial ili revenus? Estas ja pagite! »

« Precize tial ili revenos, » li malgaje respondis.

Kaj ili revenis.

Unu diris : « Ni pagis. »

Alia diris : « Pagis ni. »


Tiam la patrino diris :

« Nenio! Estas la virinoj kiuj pagis. Mi

volas vidi mian infanon. La viroj silentu kaj manĝu. Ĉi tiu tago ne similas la aliajn tagojn. Tiam tagon oni travivas nur unufoje. Bedaŭrinde, ĝi tiel malmulte impresas la virojn. La viroj estas kriemuloj; ion kroman ili ne kapablas. Virino sentas tiun ĉi tagon pli profunde, ĉu ne, infano mia? Ĉu vi ĉiuj volas momenton aŭskulti min? Ni ne ĉagrenu unu la alian. Ni devas almenaŭ toleri unu la alian. Plej bone estus ke la homoj amu unu la alian. Kial disputi? Jes, kial? Post eĉ ne unu jaro, ni ĉiuj vetkuros al lulilo. »

La edzineto larmokulis. La novelzo ĉifis sian buŝtukon. La viroj ne kuraĝis rigardi unu la alian. La alia patrino ridetis.

Ili silentis, manĝis, kaj tio estis la plej bona, kion ili povis fari.




Tweede (goedkope) uitgaaf van het Succesboek van GRAAF FOLKE BERNADOTTE

Een historisch document Rijk geïllustreerd

Ingenaaid : fr. 38.50

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO, Brussel



Een keur van acht novellen van LODE BAEKELMANS in vertaling van Jan van Schoor L. K.

De eenvoudige, vlotte vertaling maakt dit werkje ook voor beginners dadelijk genietbaar, wijl meergevorderden er niet minder genoeg zullen aan belevan.

Ingenaaid : fr. 15.—

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO, BRUSSEL

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ
kun premioj

ATENTU: La regularon bonvolu legi en la januara numero.
PREMIO: Post la 16-a enigmo, F-ino St. Popelier, el Blankenberge, gajnis la premion: La Fera Kalkanumo, romano de Jack London.

N-ro 18: KRUCVORTENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
12	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

HORIZONTALA. — 1. Skribe rilati kun iu. (R). — 2. Malkomuna. (R); prefikso; birdo (R). — 3. Oficiala kostumo de juĝisto (R); iumaniere kuirita viando. (R). — 4. Persona pronomo; ĝi troviĝas en preĝejo. (R); sufikso. (R). — 5. Prepozicio; parto de okulo. (R). — 6. Konjunkcio; superega inteligento (R); ekzistanta nur en la spirito. (R). — 7. Sufikso. (R); puŝi ion, glitigita ĝin. (R). — 8. Plenda ekkrio (R); malsama. (R); kortbirdo. (R). — 9. Arbo. (R); pezo de kesto, papero, ks., kiu enhavas la varon. (R). — 10. Per-

ESPERANTO IN OOSTENRIJK



Na acht jaar herleeft de Esperantobeweging in Oostenrijk. Het Esperanto-Centrum in de Neutorgasse 1, te Weenen.

sona pronomo; unu el la unuaj adeptoj de Esperanto en Rusujo: tradukis poemojn esperanten. — 11. Sufikso. (R); trinkajo. (R); eŭropano. (R). — 12. Esprimi sian malkontentecon. (R); parto de la vizaĝo. (R).
VERTIKALE. — 1. Legomo. (R); kurba fermita linio. (R). — 2. Kontraŭstari. (R); nekomuna. (R). — 3. Perforte ŝteli; malkonfesi. (R). — 4. Parteto. (R); enmeti pafajon en pafilon. (R). — 5. Sufokpremi. (R). — 6. Konjunkcio; tia estas homo.

kiun oni penas ne renkonti. (R). — 7. Firme restanta ĉe propra volo. (R); ĝi ellaboras sukera substanco. (R). — 8. Oficiala oficisto, kiu redaktas kontraktojn. (R); prepozicio. — 9. Muzika ritma melodio. (R); prepozicio; veturigisto uzas ĝin. (R). — 10. Afero. (R); persona pronomo; Kovri. (R). — 11. Loko en la haŭto, malmoliginta pro frotado. — 12. Senrada transportilo. (R).
Sendu la solvon al la redakcio antaŭ la 20-a de decembro!

ĈAPITRO 17-a

«Nu, nu, Profesoro De Groot estis ĉi tie?» Kant signife kapklinis al Gulopez. Li plezure vidis kiel diligente tiu ĉi notas. «Ĝin ni tuj kontrolos.»
«Nepre faru, sinjoro Kant. Mi neniel kulpas la murdojn. Kredu min.»
«Bone, mi vidas. Sed nun, la veron pri la ŝtelo.»
Detalon post detalon Alex Steinmann konfesis la tutan kielon. Li kartludis, komence por moneroj, poste por sumoj. Lia ŝanco ne estis favora. Li baldaŭ ŝuldis al Dubois pli ol li povis pagi. En lasta malspera provo por regajni ĉion en unu fojo, li duobligis siajn ludosuldojn. Dubois ne volis ludi plu, postulis subskribitajn atestojn.
«Kiom sumiĝis via ŝuldo al Dubois?»
«Ĉirkaŭ dudek kvin mil frankojn», hezitis la juna viro.
«Atentu, Alex Steinmann, vi denove mensogas!»
«Estis almenaŭ tiom. Mi ne plu ĝuste scias.»
«Donu la paperojn, kie ili estas?»
«Mi ne plu havas ilin.»
«Kie vi lasis ilin?»
«Mi ĵetis ilin en la maron, tra la lukon.» Apenaŭ momenton li levis la kapon kaj oblikve rigardis malantaŭ sin.
«Ĉion ĵetis?»
Alex kapjesis. La dentoj de Kant grinccis. Li jam timis tion.
«Kial vi ne petis la monon al via patro?»
«Mi ne kuraĝis. Tio! Vi ne konas lin! Alie mi ne estus riskinta la ŝtelon. Mi timis ke, post la morto de Dubois, ĉio malkaŝiĝos kaj ĝi ŝajnis tiel facila. La pordo ne estis ŝlosita. Mi sciis kie kuŝas la kambioj. La tirkesto malplenis, sed sur la ŝranko troviĝis tuta ligajo da paperoj. Esperante ke ili estos en ĝi, mi kunprenis la tutan pakon, kaj ree fuĝis ĉi-enen. Mi unue disŝiris la kambiojn kaj ĵetis ilin en la maron. Poste la reston.»
«Ĉu vi ludis kun Dubois sola?»
Inter la demandoj estis paŭzetoj, tiel ke eblis al Doktoro Gulopez bone registri ĉion.
«Komence ankaŭ la notario iam kunludis. Poste tio okazis nur inter Dubois kaj mi. Mi ade esperis regajni ĉion, sed Dubois fripone ludis. Mi neniam murdis, sed Dubois havas sian meritajn. Mi malmamis tiun viron.»
«Kiam vi lastafoje ludis?»
«Antaŭhierau vespere.»
«Alex Steinmann, se via alibio ne estos jesigita, vi falos de sitelo en barelon, viro!»
«Sed ĝi estos jesigita, sinjoro Kant. Se vi ne kredas mian patrinon, Profesoro De Groot certe konvinkos vin. Pasintnokte, li estis ĉe mi, tie ĉi.»
«Nu, nu!»
«Mi estis senespera pro la ŝuldo. Estis io kroma, io persona, kiu turmentis min. Mi trinkis pli ol necese. Mi certe malsaniĝis, trapasis krizon aŭ ion tian. La Profesoro flegis min.»
«Kiam precize?»
«Mi ne scias. Mi longe senkonsciis.»
«Ĉu petis vi al la Profesoro ke li sekretu la aferon?»
«Ne mi. Estis... estis mia patrino, mi kredas.»

JAĤTO VETURAS EL...

«KRIMINALA ROMANO»

Tradukis: Dro T. Ken.
Verkis: Deck Dorval.

Kant cerbumis kelkajn momentojn.
«Ĉu la persona afero, kiun vi aludis, eble estis la rompo kun Fraŭlino Sterlen?»
«Kiel vi scias tion? Ĉu tio iel intervenas?»
«Ĉu...?» Kant insistis.
«Jes... Kiel vi nun traktos min...?»
La vortoj venis angoraj, hezantaj el la mallarĝaj tremaj lipoj.
«Vi unue subskribu viajn ĵusajn deklarojn. Ĉu preta, Doktoro?»
La ŝakmajstro transdonis siajn paperojn al Kant. Aŭdinte voĉlegi ĉion, Alex Steinmann obee subskribis.
«Kaj sekve, kuniru al la kapitano. Vi provizore loĝos en alia kajuto. Jes, jen la rezulto. Kaj ne petolu, kviete akompanu nin, kvazaŭ nenio okazis. Skandalo neniel necesas. Ĉu vi havas armilon? Venu, vestesploro.»
«Mia brovningo kuŝas en la tirkesto de la tualeta tablo...»
La manoj de Kant lerte glitis sur la poŝoj de Steinmann.
«Venu, ni ekiru.»
Kapitano Joost gapegis kiam li vidis la tri virojn aliri lin. Li tuj komprenis ke la juna Steinmann kulpas pri io.
«Jen, kapitano. Ĉu vi bonvolas instali ĉi tiun sinjoron kie la aliaj pasaĝeroj ne embarasos lin?»
«Ĉu vi fine kaptis lin, Inspektoro?»
Liaj lipoj kurbiĝis iom supren, kiel ĉe atakpreta hundo. Li aspektis kvazaŭ li preferu tuj disŝiri sian viktimon.
«Ne jam, kapitano. Sed mi volas provizore izoli lin.»
«Do, ne jam. Bedaŭrinde, ĉar...» Lia gesto superfluigis pluan eksplikon. «Tiam, kuniru. Mi ja devas elasi tiun stultulon, ĉar per amaskarocero la jahto ne estis ekipita. Cetere, bela ajo. Ba!»
Li jam staris antaŭ la budo. La seruro grinccis. La maljuna Henk palpebrumis pro la lumo.
«Antaŭen fripono, al via laboro, kaj venontfoje... Ek!»
La maristo pafis sin for.
«Kaj sekve... ĉu sinjoro Steinmann volas enpaŝi?»
Alex iom posteniĝis.
«Antaŭen, ulo», Kant insistis, «ne skandalu... Ĝis nun neniu vidis nin. Se via alibio estas vera vi rapide eliros.» Alex ne plu kontraŭstaris. Lastafoje time-riĝardante al Hans Joost, li enpaŝis.
Rec grinccis la seruro.
«Ĉu la afero antaŭeniras, Inspektoro?»
«Jes, jes, ni progresas. Ankaŭ iom da pacienco.»
Doktoro Gulopez malkaŝe eldiris sian miron pri la enkarcerigo de la juna Steinmann.
«Se lia rakonto pri krizo kaj tiel plu estas vera, li ja maleble plenumis la murdon de Maxton.»
«Ni unue ĉion kontrolu, Doktoro. Mi enŝlosas lin ĉefe por sekurigi lin mem.» Terurego atakis Kapitanon Joost.
«Vi ja ne konjektas trian murdon, Inspektoro?»

«Ne, sed mi ne ŝatus ke la stulta ventkapulo saltu en la maron. Tiu senenergia, idiotigita drinkulo, en sia aktuala stato ĉion kapablas.»
«Tiam ni krome devus elakvigi lin!» Hans Joost furioze piedbatis kablrolulon.
«Ĝis revido, Kapitano. Mi nun informos lian ĝentilan patrinon, pri la situacio.»
«Mi iomete sentas min», la ŝakludanto ridetis kiam ili denove solis, «kiel la unuaj kristanoj, kiam ili alfrontos la leoninon en la areno.»
«Mi ne vidas ŝin sur la ferdeko», Kant konstatis, «ni do trovu ŝin en ŝia kaĝo.»
Sinjorino Steinmann trabe rigidis sur ŝego kiel se ŝi atendis la viziton. Si glacie direktis la okulojn al la envenantoj. Si kuntiris sian buŝon liniete.
«Sinjorino Steinmann, mi bedaŭras ke mi devas ĝeni vin per paro da demandoj.»
«Jes.» La voĉo estis sensenta kaj tute ne invita.
«Kie estas via edzo, sinjorino Steinmann?»
«Li iris al la salono por fumi cigaron. Mi abomenas tabakodoron.»
«Kie vi estis hieraŭ inter la dudek tria kaj duono kaj noktomezo?»
«Ĉi tie en la ĉambro.»
«Sola?»
«Ne, kun mia edzo. Ni devis priparoli diversajojn.»
Doktoro Gulopez miris ĉar la pridemando tiel glatas.
«Kial vi vojaĝas tute sola, sinjorino Steinmann? Mi celas: sen servistaro.»
«Ordonu de sinjoro Maxton. Li ne deziris inajn servistojn sursipe. Mi jam ofte indignis pri tio.»
«Ĉu ne estis aliaj kialoj?»
«Ne, nur la ekstravaganco de Maxton. Ankaŭ la grafino petis la permeson kunirigi ĉambristinon. Ne sukcesis. Mia edzo diris al mi ke sinjoro Maxton ne toleras inajn servistojn por... eviti incidentojn kun la ŝipanoj.»
Sia parolabundo forte mirigis Kant.
«Vi do restis la tutan vesperon sola kun via edzo?»
«Nepre, la tutan vesperon. Mi eniris iom antaŭ la dudek tria. Mia edzo iris en sian ĉambron, flanke de tie ĉi, ĝuste post noktomezo.»
«Ĉu vi malgraŭe ne eliris?»
«Ne sinjoro. Mia edzo ankaŭ ne. Eĉ ne ĝis en la koridoro.»
«Ĉu vi tute certas?»
«Sinjoro Kant, mi ne kutimas ripeti la samon. Mi tute certas kion mi diras.» Ĉiu vorto estis malrapide kaj emfaze elparolata.
Kant flegme ekdisis kvankam ne invitive. Sekve li diris malrapide, iom imper- tinenta, akcentante, ĉiun vorton:
«Vi verŝajne ne plu aliris vian filon?»
La ŝtalgrizaj okuloj eĉ ne fikligis.
«Ne!» ŝi tranĉe akris. «Mi ne foriris de tie ĉi.»
«Mi ja ripetas mian demandon. Vi do ne plu vidis vian filon?»
«Tion mi ne diris.» Ŝi sentis la neŝan- celeblan firmecon de Kant. «Mia filo venis

ANONCETOJ
Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr.
Enpresigo kostas minimume 15 bfr.
Unu int. respondkupono valoras 3,50 bfr.

KRISTNASKO-NOVJARO! Delikataj, dukoloraj kartetoj en kovertoj kun deziresprimoj «Agrablaj Kristnaskon kaj Bonnan Novan Jaron» estas mendeblaj ĉe F.E.I. Prezo: 1 bfr. (rab. 10% al la sekcioj de Fl. L. E.).

W. BORSJE, Multatulistraat 29, Rotterdam-W (Ned.) donas detalajn informojn pri la detruo kaj rekonstruo de Rotterdam kaj deziras seriozan korespondadon (preferu kun fakuloj) pri detruo kaj rekonstruo de urboj kaj vilaĝoj.

FLANDRAN KORESPONDANT(IN)ON dez. S.ro Korinek, bicikloendisto, str. de Komensky 482, DOBROVICE, Ĉeĥoslovakio.

RIA VAN DIJK, komercantino, Damastraat 39, Haarlem (Ned.) dez. korespondi per ilustritaj poŝtkartoj.

KIU POVAS HELPI al mi retrovi mian antaŭmilitan korespondantinon: Mariette Staelens, Paanderstraat 2, Waregem. Mi estas 23-jara filmisto kaj dez. korespondadon kun ĉiuj landoj kun fraŭlinoj kaj kolegoj. Skribu al: Ilja Hristov, str. Ĉerkovna 39-b, Sofia, Bulgario.

KUN LA TUTA MONDO dez. kor. pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi kion ajn: Karl Linek, Bahnhofstr. 27, Ried im Innkreis, Aŭstrio. Ĉiam kaj tuj respondas.

INSTRUISTOJ, ATENTU! La franca progresema edukmovado «Presarto en Lernejo» havas Korespond-Servon kiu celas praktikigi E-on al infanoj eĉ se ili ankoraŭ ne konas la lingvon. El via kunlaboro povas rezulti multe por la int. lingvo! Nepre petu informojn al Lentaigne, Balarue-les-Bains (Hérault), Francujo.

tien ĉi iom post la dudek tria kaj duono.»
«Li malsanis, ĉu ne?»
Moviĝis eĉ ne unu muskolo de la ŝtona vizaĝo.
«Ne, li iom ebruis.»
«Ĉu Profesoro De Groot venis tien ĉi?»
«Kiam?»
«Post la dudek tria kaj duono.»
«Ne, Kiu asertas tion?»
«Via filo!»
Siaj lipoj ankoraŭ pli kuntiriĝis.
«Alex multe tro ebruis. Li maleble scias ion.»
Kant ne komprenis kial ŝi tiel obstine neadas la fakton, kiu ja nediskuteble liveris al ŝia filo, kaj al ŝi mem kaj al ŝia edzo nepran alibion. Escepte se Alex mensogis...
«Kaj se Profesoro De Groot mem deklaris tion.» Kant blufis.
«Tiam li mensogis», ŝi sentone diris. Nun io ne plu kongruis. Estis funde primeditita defendo. Aliaj rimedoj trudis sin. Kant opiniis la momenton konvena por ekuzi la pezan artilerion.
«Vi scias ke Dubois estis ĉi posttagmeze murdita?»
«Mi eksciis tion.»
«Vi ne konas la murdanton?»
«Ne, kompreneble ne.»
«Mallonge post la murdo, oni perfortis en la ĉambron de Dubois.»
Siaj okuloj flagris.
«Jes, kaj... kien vi volas?»
«Oni ŝtelis paperojn, Sinjorino, paperojn certe valorajn por la enketo.»
«Jes, kaj tiel ĉi tio rilatas kun mi?»
«Ŝtelis la paperojn via filo!»
Pasa ruĝo koloris ŝiajn vangojn, ŝi ja perdis sian aplombon, nur paron da sekundoj, tiam ŝi denove regis siajn nervojn.
«Mi ne kredas ĝin.»
«Li rekonis. Mi havas lian subskribitan deklaron.»
«La azeno!» Sekvis paŭzeto. «Kie li estas?»
«Arestita! Sinjorino Steinmann, foje meditu. Via filo malmamis Dubois, al kiu li ŝuldis gravan ludosumon. Li malmamis lin ankoraŭ, ĉar Dubois amindumis kaj konkeris fraŭlinon Sterlen, kiu rompis sian fianĉiniĝon. Li ŝtelis la paperojn kaj tial evidente estas suspektata pri la murdo de Dubois kaj ankaŭ de Maxton. Ĉu vi komprenas la gravecon de alibio, Sinjorino? Ĉu Profesoro De Groot tien ĉi venis pasintnokte, jes aŭ ne?»
Sinjorino Steinmann senmove restis sidanta sur sia ŝego. Nun la spasme kunpremitaj manoj perdis la internan batalon, kiu furiozis en ŝi.
«Nu?»
«Nenion mi povas aldoni al miaj jamaj deklaroj. Profesoro De Groot ne estis tie ĉi!» (Daŭrigota)

HOTEL MONDIAL
15 Graaf d'Ursellaan 15
HEIST-AAN-ZEE
Nette kamers - Verzorgde keuken
Fijne dranken

Verantw. uitgever F.E.I. — Bestuurder: E. Cortvriendt, P. van Humbekstraat 3, Brussel. — Drukkerij A. Hessens, Comediantenstraat 12, Brussel.